HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Esperanto, Internacia lingvo

Ĝernobildo en la „Szentendrei” Skanseno.
Fonto: Vikipedio

4
---------- 67-a jarkolekto
2023

HUNGARA FERVOJISTA MONDO
Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.
.....
Respondeca redaktoro:
István Gulyás
Eldonas:
Hungara Fervojista Esperanto-Rondo
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapest
Rákos út 98. I/9.
Aperas kvaronjare
Abonprezo: al hungara adreso: HUF 4500
al eksterlanda adreso: EUR 15
*
MAGYAR VASUTAS VILÁG
A magyar eszperantista vasutasok központi lapja
Felelős szerkesztő: Gulyás István
Kiadásért felelős
A Magyar Vasutas Eszperantó Kör
„Szkenguru" Nyomda Budapest
Felelős vezető: Balla László
.....
ISSN 0230-323x
.....

ENHAVTABELO:

62. I. Gulyás: Niaj aktivecoj

63. L. Gabalda: La 108-a UK en Torino

65. L. Gabalda: La 56-a ILEI kaj 79-a IJ Kongresoj

66. I. Gulyás: La „NOHAB" havas 60 jarojn

67. I. Gulyás: Kuriozaj fervojoj

69. I. Gulyás: Interesaĵoj pri la fervojoj

71. I. Gulyás: Hungaraj Skansenoj

74. I. Gulyás: MÁV Simfonia Orkestro

76. I. Gulyás: Fortikaĵoj sur la Altlando de la Balatono

79. I. Gulyás: Nekrologo: D-ro Imre Ferenczy

67-a jaro N-ro 4, OKTOBRO - DECEMBRO

Niaj aktivecoj

Denove proksimiĝas la fino de la jaro , kaj en ĉi tiu tempo estas ŝuldata doni kalkulon pri nia agado kaj konsideri la novan situacion pri nia nova organizo.
En la jaro okazis agrablaj okazintaĵoj kaj bedaŭrinde kelkaj malgajaj eventoj. Inter la agrablaj okazintaĵoj mi mencias pri la transformiĝo de nia Hungara Fervojista Esperanto-Asocio al Hungara Fervojista Esperanto-Rondo. Mi scias ke la ŝanĝo de la nomdono tiam signifas rezulton, se mem la aktiveco estas efika, kaj helpas efektivigi la entreprenitajn taskojn. Ĝis nun tiujn taskojn ni ne povis senreste realigi, sed tamen sukcesis enpagi la jarkotizon por kvin hungaraj fervojistaj esperantistoj al IFEF, sukcesis trovi taŭgan komitatanon ĉe IFEF, kiu bone reprezentas nian rondon. Estas grava rezulto, ke nia faka revuo Hungara Fervojista Mondo (HFM) aperis en la planitaj limdatoj kaj ampleksoj, eĉ en bona kvalito. Sukcesis laŭ ties ordo kaj maniero aranĝi nian bibliotekon, kaj fermi la financajn aferojn de la asocio, eĉ ordigi la interrilatojn kun la ŝtataj organizoj.
Ni ankaŭ havas multajn verajn problemojn kaj eventojn. La plej profunda doloro estis la morto de D-ro Imre Ferenczy, kiu estis nia plej konata membro kaj la plej bona kaj neforgesebla amiko. Inter la gravaj malfacilaĵoj mi mencias la ĉeson de preskaŭ ĉiuj fakgrupoj, la altan aĝon de la membraro, la mankon de gejunuloj kaj normalan oficejon, la monmankon ktp.
Se mi ekzamenas la taskojn kaj konkretajn rezultojn, mi ne estas optimisto, nur mi esperas la sukceson, ke nia organizo trovos la konvenan vojon kaj agadmanieron por la plua Esperanto-agado. Kial jam nun mi skribas pri tiuj aktivecoj, ĉar ni povus plibonigi kaj solvi kelkajn problemojn en la restintaj tri monatoj.

István Gulyás

La 108-a UNIVERSALA KONGRESO EN TORINO (29.7. – 5.8.2023)

Torino estas pli ol dumiljaraĝa urbo, situanta en la nordokcidenta parto de Italio. En ĝi troviĝas multnombraj muzeoj, galerioj, palacoj, kasteloj, placoj, diverstipaj monumentoj, preĝejoj kaj aliaj religiaj konstruaĵoj. Tie, en la kapelo *Sindone* troviĝas ankaŭ la fama „Mortotuko". La plej karakteriza monumento estas nepretervidebla turo kun bela kupolo. Temas pri la 167,5 metrojn alta *La Mole Antonelliana.* En ĝi estas instalita muzeo pri film-historio. La urbon trafluas la granda rivero Pado kun ties tri alfluantoj. Torino estas konata pro siaj tradicioj en kuirarto: picoj, vinoj, kafoj, ĉokoladoj, glaciaĵoj, specialaj dolĉaĵoj kaj ankaŭ la aŭtomobil-firmao Fiat. Ĝia simbolo estas Taŭro. En la urbo troviĝas sennombraj verdaj fontanoj kun taŭra kapo el kiu fluas trinkakvo.

En Torino jam okazis pluraj Esperanto-kongresoj. Ĉi-foje la kongresejo situis en la Politeknika Universitato de Torino. Al la kongreso aliĝis 1319 geesperantistoj el 69 landoj. Venis reprezentantoj el ĉiuj kontinentoj. La kongresa temo estis: „Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj." Ĝi estis traktata en pluraj prelegoj. Sabate en 29-a de julio la ĉina esperantistino Gong Xiaofeng (Arko) estis elektita kiel nova estraranino de UEA. Vespere okazis la kutima, kaj jam de pluraj jaroj ŝatata Movada Foiro, kie la diversaj Esperanto-asocioj prezentas sin per broŝuroj, propagandiloj kaj aliaj Esperanto-objektoj kun intenco akiri novajn membrojn por sia asocio. Dimanĉe en la salono Zamenhof okazis la solena malfermo de la kongreso fare de la prezidanto Duncan Charters, kaj poste la kongresanoj kunfotiĝis. Tuj en la posttagmezo komenciĝis la kongresa programo: IKU-inaŭguro, paroligaj lecionoj, Ĉina Tago, Enkonduko al la Kongresa Temo, prelego pri Italio, Aŭtora duonhoro, Komitata Forumo, ILEI-prezento kaj aliaj prezentaĵoj. La tuta kongresa programo estis tre ampleksa, do ne eblas listigi ĝin, kaj ne eblis partopreni en ĉiuj eventoj kiuj okazis samtempe en diversaj salonoj. Ĉiu devis mem elekti tion kio plej konvenis kaj plaĉis. Dum la Kleriga lundo kaj la marda Tago de lernado okazis multaj interesaj prelegoj koncernantaj ne nur la lernadon. Tiuj tagoj estis tre aprezataj de la kongresanoj. Dum la semajnaj antaŭtagmezoj eblis aŭskulti koncertojn de Grazia Barboni,Flut-tripo, Kimo, Kajto, Bardoj, JoMo, Jomart kaj Natasa, Kjara, Abel, kaj spekti teatraĵojn: "Ludoj kun diabolo kaj reĝo" aŭ „D-ro Esperanto". Vespere okazis jenaj prezentadoj: „Nacia Vespero", Bankedo kaj

La kongresurbo Torino

Kongresa balo, Teatraĵo „Mi diros al vi sekrete” prezentita de Georgo Hanzlik kaj Saŝa Philipoviĉ, koncerto „Blua Horizonto”, „Internacia Arta Vespero”.

La prezidio de la kongreso dum la inaŭguro

Ĵaŭde posttagmeze okazis la tradicia futbalmatĉo, en kiu ĉifoje venkis je 6:3 la teamo de esperantistoj kontraŭ tiu de peruaj enmigrintoj**.** En la enirhalo sukcese prezentiĝis membroj de la venonta kongreso en Tanzanio vendante multajn interesajn objektojn al la geesperantistoj. Tanzania Ambasadorino en Italio montris sian ĉeeston inter la venontjaraj organizantoj de la kongreso en Aruŝa. Ankaŭ ĉeĥoj vendis diversajn artiklojn (ĉemizojn, librojn kaj italajn vinojn) por profitigi la venontjaran kongreson. En la vestiblo estis instalita libroservo. Tie eblis aĉeti librojn donace por Tanzanio, sed ne nur. Samloke okazis aŭtoraj duonhoraj prezentadoj de diversaj libroj. Kiel kutime okazis ankaŭ Esperanto-kursoj kaj ERR-ekzamenoj de ĉiuj niveloj. Aperis pluraj artikoloj en ĵurnaloj. Dum la kongreso prezentiĝis pluraj asocioj. Okazis Ekumena Diservo, Erasmus+, TEJO sinprezentas, Internacia Koruso, Ŭombulismo, Bona Espero, Belartaj Konkursoj, Oratora Konkurso, UNO kaj UNESKO, prelegoj pri Italio, itala lingvo, Meditado, Vortludoj, Afriko, Eŭropo, Ameriko, Juristoj, Esperantologia Konferenco, Libroj de la jaro, Bobelarto, Komitata Forumo, Ateliero pri origamio. La Kongresa Kuriero „La Taŭra voĉo” informis pri aktualaĵoj kaj ŝanĝoj en la programo. En la korto esperantistoj ne nur dancis, sed ankaŭ ludlernis. Multnombraj estis duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj al interesaj lokoj de la lando, kiuj allogis ĉiutage multajn partoprenantojn. Ĉe la solena fermo prezentiĝis infanoj en sia kongreseto, kaj ĉe la fino estis transdonita la Esperanto-flago al la reprezentantoj de la venonta UK en Tanzanio. Ĉiuj estos bonvenon partopreni la kongreson okazantan unuafoje en la Afrika kontinento.

Fervojistaj esperantistoj dum la kongreso

Kion diri ĉe la fino? Koncize, ke ĝi estis tradicia kongreso kun tradiciaj temoj, konferencoj, amuzaĵoj. La Landa Kongresa Komitato preparis buntan kaj interesan semajnan programon kaj zorgis pri ĝia bona disvolviĝo. Do, gratulon al la organizantoj de tiu ĉi impona evento.

Liba Gabalda

La 56-a ILEI KONGRESO kaj la 79-a JUNULARA KONGRESO (5-12.8.2023)

Ambaŭ kongresoj komune okazis tuj post la Universala Kongreso en Torino. De tie ni translokiĝis al Lignano Sabbiadoro ĉe la marbordo. Al ILEI aliĝis 157 geesperantistoj el 30 landoj kaj la IJK arigis 98 partoprenantojn el la tuta mondo. La kongresoj okazis en tre bela rezidejo *Bella Italia* ĉe pinarbaro kun zumantaj cikadoj. Tie ni loĝis en pluraj domoj dise en la arbaro kaj la programeroj okazis en kvin malsamaj lokoj je diversaj distancoj. La kongreso de ILEI estis hibrida, do aliaj esperantistoj kiuj ne havis eblecon ĉeesti pro manko de vizoj aŭ pro aliaj kaŭzoj, povis profiti de kelkaj programeroj rete de sia hejmo kaj samtempe eblis interveni aŭ prezenti siajn prelegojn. Tio estas granda avantaĝo kaj ŝparo de vojaĝkostoj por multaj samideanoj. Okazis multaj samtempaj programeroj kaj ni povis ĉeesti alterne iun ajn el ambaŭ kongresoj.
La ĉefa temo estis: "Intergeneracia kunlaboro pri edukado - instrui Esperanton en lernejoj". Ĝi estis plene reprezentata en la komuna programo.
Kaze de la inaŭguro, en la salono Zamenhof, bonvenigis nin la jenaj reprezentantoj: Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni, Alessandra Madella. Nome de la junularo salutis la nuna prezidanto de TEJO Alberto Stalin Garrido kaj la venonta prezidanto Tyron Surmon. La ĉefparoladon prezentis la prezidanto de UEA Duncan Charters. Oni legis diversajn salutojn de lokaj instancoj kaj de aliaj esperantistaj asocioj. Rete salutis la prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi. Honoris nin la ĉeesto de la jam menciita prezidanto de UEA, de la sekretario Alex Kadar kaj de la ĝenerala direktoro Martin Schafer. Post la inaŭguro ni komune fotiĝis. Dum la komunaj kongresoj okazis lingva festivalo, kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, Esperanto-instruiloj en la bildkarta varbado, Trejnseminario - "Interkultura kompetento", Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la mondo, Frazeologio, Lernolibroj de Esperanto, La vojo al perfektiĝo, Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Rusio, Esperanto-instruado en ĉinaj lernejoj, Kutimoj, Tradicio kaj historio de Ukrainio, 60-jariĝo de la revuo Kontakto, La 30 oraj horoj, Flagoj de la prelegantoj, Vivi kaj vivigi la lingvon, Esperanto-movado en Malagasio, Enkonduko al ĵurnalismo, Movadaj spertoj en Sudameriko, La projekto Verden en rilato kun instruado, Ludforma origamia ateliero, Origamio kiel arto kaj scienco, Karaokeo, Duolingo, Birda migrado en la Amerikoj, Tanzanio kaj la UK en 2024. Estis pluraj prelegoj kaj sciigoj pri Litovio kaj Ukrainio, Ĉernobil, Homaj rajtoj en Pakistano, Instruado de la kroata lingvo, Instrui lingvon al pliaĝuloj. Ek Italio-malkovro de la lando per vojaĝo inter la dudek regionoj de Italio kaj per rigardo de iliaj kulturoj kaj tradicioj. Interesa estis la prelego pri "Bonkvalita teo similas al belulino". Krome okazis AMO (Aktivula Maturiĝo) seminario 102 kun titolo: "Interkulturo en Lernejoj". Estis diversaj diskutoj kaj interŝanĝoj pri instruaj spertoj. "Forumo por lernejaj instruistoj", "Scienca simpozieto". Eblis lerni Esperanton per afrikaj lingvoj kaj (inverse) afrikajn lingvojn per Esperanto. Bone funkciis ankaŭ libroservo.
Estis proponitaj allogaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj: Udine, Marano Lagunare, Aquileia kaj Grado, Venecio kaj Murano, Triesto kaj Groto Giganta, San Vito al Tagliamento kaj San Daniele del Friuli.
Vesperaj programeroj konsistis el koncertoj de JoMo, Ĵomart kaj Nataŝa, Muzikalo I: "Petveturaj aventuroj", Muzikalo II: "La sorto gvidos vin". La gejunuloj okazigis "Movadan Foiron" kaj organizis frandan vesperon "Trinkomanĝa nokto" kun bongustaĵoj el la tuta mondo. Post ĉiuj vesperaj programeroj ili dancis laŭ diversaj ritmoj kaj amuziĝis ĝis la tria horo en gufujo.Eblis spekti filmojn, praktiki jogon, ĉigongon, aikidon, internaciajn popoldancojn, krei sian unuan retejon aŭ korean paperan ventumilon, aperis ludforma origamia ateliero, kvizo, teatraĵo "Edukado por paco", Metropola tuteŭropa trajnreto, La Granda Homa Ĉeno - Ma-Ga filmo. Eblis sporti kaj ĝui la plaĝon. Gejunuloj prezentis la venontan IJK, kiu okazos en Litovio.Okazis kunvenoj de BEMI, Komitato de ILEI, Asembleo de Itala Instituto de Esperanto, Prelegoj pri famaj virinoj: Luisa Spagnoli, Antonietta Bernadoni, Verda Majo, Paola Masino, Tina Modotti, Maria Montessori,

Flannery O' Connor, Marjorie Boulton, Marie Sklodowska-Curie, fratinoj Anna kaj Helene Michelau - du artistinoj el Orienta Pruslando, Danica Bedekovic' Pobjedniĉka kaj Anatonija Jozic'.
Esperantistoj ĝenerale estas scivolemaj kaj ŝatas kontaktojn kun nekonataj homoj, tiel la kongresanoj havis okazon konatiĝi kun homoj el aliaj kontinentoj de malsamaj kulturoj.
Vendrede vespere okazis la ferma ceremonio de ambaŭ eventoj. La aĝuloj kaj la gejunuloj bone interrilatis kaj ĝuis komunajn eventojn. Koran dankon al la organizantoj pro la bona sukceso!

Liba Gabalda

LA „NOHAB" HAVAS 60 JAROJN

La dizellokomotivoj Nohab havas sesdek jaraĝojn, ĉar la fabrikado de la sveda „stalmiraklo" komenciĝis en jaro 1963. Tiuj lokomotivoj ricevis la identigan numeron M61, kaj tiam enfokusiĝis la aĉetado de tiu lokomotivo en Hungario, kiam la vaportrakcio komenciĝis regresi. MÁV planis evoluigi la dizelizadon kaj elektrizadon, kaj al ĉi tio estis bezonata novaj grandpovumaj dizellokomotivoj. Ĉar en tiuj jaroj ankoraŭ nur kelkaj fervojlinioj estis elektrizitaj, pro tio aĉetado de elektraj lokomotivoj ne estis aktualaj.

Nohaboj en la stacidomo Budapeŝt-Ferencváros

MÁV elskribis publikan adjudikon por grandpovumaj dizellokomotivoj en 1960. Entute du konkursojn ricevis MÁV, kaj fine la gajninto de la konkurso estis la sveda fabriko „Nydqvist & Holm AB Nohab". MÁV mendis 20 Nohab-lokomotivojn, kiujn la fabriko transportis en jaroj 1963-64. La unua dek lokomotivoj estis postenigitaj en Budapeŝto kaj la ceterajn ricevis Debrecen. La taskoj de tiuj lokomotivoj estis la efektivigo de la internaciaj kaj rapidtrajnaj trafikoj, eĉ la tranzita vartransporto inter Budapeŝto kaj Vieno kaj inter la pli grandaj limstacioj.

La Nohab-lokomotivoj havis grandan popularecon inter la lokomotivestroj, ĉar la Nohaboj estis la plej fidindaj lokomotivoj. Ankaŭ la vojaĝantoj ŝatas la Nohabojn pro la ekstera, tondona kaj fidinda proprecoj.

Nohab prenas pasaĝertrajnon apud la Balatono

Ekde la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento la Nohaboj laŭgrade malaperis el la fervojretoj, pro la elektrizado de la fervojlinioj. Se la Nohab-lokomotivo difektiĝis pro teknikaj problemoj, aŭ havis akcidenton, MÁV jam ne riparis ilin, pro tio granda parto de tiuj Nohaboj estis amortizitaj.
En la lastaj jaroj individuaj iniciantoj prenis sub protekton de la Nohab-aferon, kaj kelkajn lokomotivojn oni riparis, kelkaj ricevis protekton por la Trafika Muzeo. Nuntempe MÁV jam ne havas Nohabojn, sed – ĉefe ĉe la Balatono – kelkaj funkcikapablaj Nohaboj trafikas kiel nostalgia lokomotivo.

István Gulyás

KURIOZAJ FERVOJOJ

Mi legis en la Vikipedio pri interesaj eĉ ekstremaj fervojoj, kiuj troveblas dise en la mondo. El ili mi prezentas kelkajn, kompreneble kun fotoj:

Wuppertala telfero, Germanio.

La Wuppertala telfero

Tiu unurela fervojo troveblas en urbo Wuppertal. La malvasta Rivero Wupper fluas tra serpentuma valo, kie estis kelkaj malgrandaj industriaj urboj, kiujn kunligis tiu telfero jam en 1901. Tiu telfero pogrande helpis la evoluadon de tiuj industriaj urboj, kaj en jaro 1929 ili kuniĝis kun la urbo Wuppertal. Tiu telfero estas la spino de la pasa-ĝertransporta reto en la urba trafiko. La traceado de la telfero sekvas la vojkurbojn de la rivero, kaj alte kondukas super la plenŝtopitaj stratoj, pro tio ĝi evitas la urbajn trafikojn, kaj rapide povas atingi la celon. La longo de la linio estas 13 km-oj, kiu kelkfoje atingas 15 metrojn super la tero. La relon subtenas 486 portaloj, kaj potage transportas pli ol 80 mil pasaĝerojn per 31 modernaj artikaj veturiloj. La telfero povas trafiki per 60 km/h, kaj la veturdaŭro estas 30 minutoj.

Stoosbahn, Svisio.

La Stoosbahn

La svisa „Stoosbahn" malfermiĝis en decembro de 2017. Ĝi estas la plej kruta fervojo, kiu estas nuntempe fama vidindaĵo, kaj altiras vizitantojn el ĉiuj partoj de la mondo. La trajno trafikas per unikaj vagonoj, kiuj havas turniĝantajn barelojn. Pere de tiuj bareloj la vojaĝantoj samloke povas stari ankoraŭ tiam, se la trajno veturas sur 110%-a deklivo supren sur la deklivo al la monto. La longo de la linio estas 1,74 km-j, sur kiu la trajno alvenas dum kvin minutoj de la valstacio ĝis la 744 metraj finstacio. Tiu fervojo estas vivnecesa instrumento por la senaŭtomobila vilaĝo Stoos, kiu situas alte sur la montegoj. Ĉiu vagono havas tri pasaĝertrafikajn barelojn kaj unu ŝarĝotransportan parton. Kvazaŭ po 10 mil tunojn da nutraĵoj transportas la trajno jare supren al la monto, kaj reen la malpuraĵojn kaj ceterajn defalaĵojn ĝi kunportas. En ĉiu horo 1500 vojaĝantojn povas transporti tiu fervojo.

Hanging Train, Ĉinio.

En la pasintaj du jardekoj la fervojevoluigo de Ĉinio estis neimageble kaj fantazie. La grandrapidaj fervojlinioj estas konsternitaj plilarĝigoj, la fervojstacioj estas interesaj arkitekturaj solvoj, la fervojaj veturiloj estas multspecaj kaj modernaj, la disciplinema personaro de la fervojo ĉiuj montras la senliman evoluon de la ĉina ekonomio. En la kadro de tiu evoluo la ĉinoj okupiĝas kun aliaj interesaj temoj. Inter tiuj estas la unua vitraplanka telfero, kiu trafikas en la urbo Ĉengdu. Tiu telfero havas kvar staciojn, kaj

11,5 km-ojn longan fervojan linion. La malpezajn vagonojn ĉinoj konstruis el karbonfilamento kaj kompozita ŝaumo-materialo.

La Hanging Train

La trajnojn funkciigas elektra energio, kiun replenigitaj akumulatoroj pelas. La plej vidinda parto de tiuj trajnoj estas la panoramaj fenestroj kaj la travideblaj plankoj. La trajno povas veturigi 120 vojaĝantojn en puraj, efikaj kaj silentaj vagonoj kaj certigas memorindan urborigardon.

Ferrobus, Sud-Ameriko.

La „Ferrobus" estas la formo de la improviza trafiko, kiu veturigas la vojaĝantojn en la montara regiono de la Sud-Ameriko. Mem la ferrobuso konsistas el karoserio de malnovaj ŝoseaj veturiloj kaj fervojaj radoj. Tiuj malstabilaj veturiloj signifas por la malproksimaj montaj vilaĝoj veran savrimedon, kiuj tute ne havas oficialajn koneksajn vojojn. La ferrobusoj uzas la forlasitajn fervojliniojn, kiujn oni konstruis en la 19-a jarcentoj al la minado de la mineralriĉaĵo. La fervojliniojn de la ferrobuso oni povas retrovi en Cilio, Bolivio kaj Kolombio inter la montopintoj de la montaro Andoj. La ferrobuso estas populara por la turistoj, kiuj serĉas la danĝerajn veturadojn kaj la nekonatajn travivaĵojn. Bolivio estas la citadelo de la ferrobuso, kie sur tri fervojlinioj trafikas tiuj busoj. La vojaĝo per ferrobuso estas harstariga travivaĵo, kaj memorinda evento.

La Ferrobus kaj la vojaĝantoj

La timiga Scenic Railway

Scenic Railway, Aŭstralio.

Malproksime de la belega urbego Sidnejo en la koro de la „Blue" montaro troveblas la „Scenic Railway", kiu konkursas la titolon: „la plej kruta fervojo de la mondo". Tiu fervojo trafikas sur sabloŝtonoj, interesaj rokformitaĵoj, tra tuneloj, kaj super la fascinaj praarbaroj, kaj ĝi ofertas harstarigan malsupreniĝon. La vitrotegmentaj vagonoj povas porti maksimume 84 vojaĝantojn. La deklivo havas 128%-jn, kiu estas timiga kruto. La trafiko okazas per kablovojo, kiu konstruiĝis en la fino de la 1800-aj jaroj, kiam ĝi estis parto de la minfervojo ĝis 1945. Ekde tiam la malfermo de la fervojo vojaĝis pli ol 2555 milionojn da homoj. La plej novaj vagonoj havas panoraman tegmenton, tiel la vizitantoj povas vidi plurajn partojn de la praarbaro.

István Gulyás

INTERESAĴOJ PRI LA FERVOJOJ

HUNGARIO

La elektra manovra lokomotivo

La „Rail Cargo Hungaria” mendis elektran manovran lokomotivon de la ĉina „CRRC Group”, kiu estas la plej granda fervoja veturilfabrikado en la mondo. La evoluigitan lokomotivon la ĉinoj prezentis en Hungario, kiu rikoltis grandan sukceson. La amaso de la lokomotivo estas 74 tunoj, ĝia teĥnologio estas elektra kaj elektra hibrida instalaĵo. La lokomotivo aplikas litiotitanatan akumulatoron, kiun oni ŝargas el la katenario, kiu plibonigas la efikecon de la veturilo. La ŝargo de la akumulatoro estas el la katenario dum 2,5 horoj, kaj el elektra reto estas dum 8 – 10 horoj. La lokomotivo estas medioindulga, kaj la maksimuma rapido estas 100 km/h. Post la ŝtata permeso de la veturilo ĝi faros priservon sur la ranĝostacioj kaj la industritrakoj, ĉar tie ne estas katenario super la trakoj. Ĝis nun sur tiuj trakoj oni faras la manovradon per dizellokomotivoj. La elektra manovra lokomotivo reprezentas senegalan teĥnologion en Eŭropo.

ĈEĤIO



Vojaĝas la bieroj al la gastoj

En la centro de la ĉeĥa ĉefurbo Prago troveblas speciala restoracio – Vytopna – kie anstataŭ kelnero ettrajno transportas la bieron al la gastoj. Sur la tabloj serpentumas la relvojo sur kiu trafikas la trajneto kaj transportas bieron en du vagonoj. Ĉiu vagono povas transporti du aŭ tri kruĉojn da bieroj aŭ aliajn trinkaĵojn al la tabloj de la gastoj. La trajnoj ne estas vivgrandaj, sed tamen estas pli grandaj ol la modelfervojo, por ke ili havu sufiĉan lokon por du-tri kruĉoj. La interno de la praga restoracio similas al grandega topografia tablo, ĉar ĉiuj tabloj havas relvojan deflankiĝon.Tiu fervojreto estas iomete komplika, ĉar la posedantoj devis efektivigi dum kelkaj jaroj tiun interesan planon. La trajnoj traveturas arbaran kaj rokan regionon, kaj klakadas tra tuneloj kaj pontoj, por ke ili povu transporti la bieron al la gastoj. Okaze de la iama estrarkunsido de IFEF, la estraranoj kaj la ĉeĥaj kolegoj vizitis tiun restoracion, kaj ni trinkis pere de la vagonoj kunportitajn bierojn. Ni ege ĝuis la viziton, ĉefe la bongustan bieron.

Tiun interesan restoracion planas realigi restoracio en la hungara urbo Szeged, kaj ĝi baziĝas la pragan restoracion por efektivigi tion.

ĈINIO

La "Potala Palaco" en Lhásza

La konstruo de la Csinghaj – Lhásza (Tibeto) fervojlinio komenciĝis en la jaro 2001, kaj dum 5 jaroj ĝi konstruiĝis, kio estis giganta plenumo. La longo de la linio estas 1142 km-j, el kiu konstruiĝis 960 km-jn super la marnivelo pli ol 4000 m altecoj. La plej alta stacio de tiu fervojlinio estas Tang Gu-la, kiu konstruiĝis sur 5068 metrojn alta. La kostoj de la konstruo estis 3,3 miliardojn da Eŭroj.

Dum la konstruaĵo okazis multaj problemoj, eĉ neatenditaj taskoj, pro tio la inĝenieroj devis fari eksperimentojn por solvi tiujn. Inter tiuj unu el la plej malfacilaj problemoj estis la frostiĝinta tero, ĉar entute 550 km-jn longa fervojlinio konstruiĝis sur frosta tero. En tiu alto la tero estas frostiĝinta ĝis 30 m-jn profundeco. Se la surtavola grundo somere fandiĝas la fandaĝakvo ne povas liki, pro tio la surtavolo malkompaktiĝas tiel, ke la relvojo kvazaŭ subakviĝas en marĉo. La inĝenieroj dum kelkaj jaroj daŭrigis eksperimentojn, kaj fine trovis la solvon, kiu certigas la bezonatan firmaĵon. Tiu solvo estas la ok metrojn longaj ŝtaltuboj, kiuj 5 metrojn profunde etendiĝas al la grundo. Tiuj tuboj estas plenigitaj kun malvarmiga materio, kiu elvaporiĝas sub la frostopunkta temperaturo. Tiu frazotransiro fortiras temperaturon el la ĉirkaŭaĵo, kaj tio certigas la ĉiamfrostan grundon por la fervojlinio. Sur kritika etapo de la fervojlinio oni prikonstruis plurmilojn tiajn ŝtaltubojn.

ĈINIO

La grandrapida trajno en Ĉinio

La Ĉina Radio Internacia sciigis gravan novaĵon pri la neimagebla plano de la Ĉina Fervojo. Laŭ tio la Ĉina Fervojo planas konstrui pli ol 3.000 km-jn da fervojoj en la jaro 2023, inkluzive de 2.500 km-jn da rapidegaj fervojlinioj por altgradigi la transportan sistemon en progresintan reton. Se ni ekzamenas la statistikajn indikojn pri la ĉina fervojreto, ni devas kredi, ke tiun planon la ĉinoj efektivigas. Laŭ mia informo en la unua duonjaro la granda parto de la plano jam efektiviĝis.

En Ĉinio ekzistas 155.000 km-jn normalŝpura (1435 mm) fervojlinio kaj el tiu pli ol 40 mil estas grandrapida fervojo. Ekzistas ankoraŭ 3.600 km-jn etŝpura (750 mm) fervojo, kiuj unuavice priservas fabrikojn, uzinojn kaj aliajn agrikulturajn terenojn. La longo de la elektrizitaj linioj estas 100 mil km-jn. Tiuj statistikaj indikoj montras la grandiozan ĉinan fervojreton, kiun la ĉinoj dum kelkaj jardekoj evoluigis kune kun la veturilaroj. En Ĉinio la fervojo estas la plej grava trafika sekcio, kiun la reĝimo kontinue apogas.

Fonto: Vikipedio

István Gulyás

HUNGARAJ SKANSENOJ

Alvenis la aŭtuno, kiu estas la tempo de la ekskursoj. Unu el la plej interesaj ekskursaj programoj estas la vizitoj al la skansenoj, kaj tie oni povas konatiĝi kun la plurjarcentaj popolaj arkitekturoj, mastrumoj kaj vivmanieroj. En la skansenoj la vizitantoj povas ankoraŭ konatiĝi kun la vivoj, laboroj, popolkutimoj kaj artoj de niaj antaŭuloj, kaj ni povas ekzameni la malnovajn konstruaĵojn kaj la iam ĉiutagajn uzitajn instrumentojn.

"Szentendrei" Subĉiela Etnografia Muzeo (Ventmuelilo)

La unuan subĉielan etnografian muzeon oni malfermis en 1891 en stokholma insulo, kion oni nomas Stokholma Skanseno. Tiu skanseno ankoraŭ nuntempe funkcias. En la mezo de la 20-a jarcento en multaj landoj elformiĝis subĉielaj etnografiaj skansenoj, el inter la plej famaj estas la finnlanda, rusa, norvega, latvia, estonia kaj kompreneble la sveda skansenoj. En Hungario pli ol 20 skansenoj riĉigas la landon de tiuj, el inter la plej gravaj skansenoj troveblas en Szentendre, Szenna, Göcsej, Őrség, Nyíregyháza-Sóstó, Szombathely kaj Ópusztaszer.

„Szentendrei" Subĉiela Etnografia Muzeo

La Szentendra skanseno prezentas la popolan arkitekturon, arton de ok hungaraj regionoj. Tiuj estas la altebenaĵaj kamparaj urboj, la Supra Tisoregiono, la Okcidenta-Transdanubio, Malgranda Hungara Ebenaĵo, Montaro Bakony, Balatona Altlando, Suda-Transdanubio kaj nordhungariaj vilaĝoj. La vizitantoj povas konatiĝi kun la vilaĝaj domoj kaj etnografioj, popolaj kutimoj, ordinaraj okupoj, ŝatokupoj, la religiecoj, kaj la gastronomioj ktp. En la skanseno funkcias loka fervojo ĉefe por la ĝojo de la geknaboj. Antaŭ nelonge oni aneksis pli novan areon al la skanseno, kiu prezentas la iaman mondon de Transilvanio.

„Szennai" Subĉiela Etnografia Muzeo

La kuriozaĵo de tiu skanseno estas, ke oni elformis ĝin en la mezo de la vivanta samloka vilaĝo. Pro tio la skanseno ricevis „Eŭropa Nostra" internacian premion. Ĝi prezentas la arkitekturon kaj la tradicion de la naturparko „Zselic", kaj multaj kulturaj programoj atendas la vizitantojn. Multfoje okazas dancaj amuzoj kaj metiistaj okupiĝoj. Al la skanseno apartenas la barokstila preĝejo, konstruita en 1785, kiu staras sub protekto pro la karakterizaj kasonoj de la plafono. La skanseno estas fama pro la planddomoj, kiujn entuziasmajn vilaĝanoj transportis el la Sud-

"Szennai" Subĉiela Etnografia Muzeo

Transdanubiaj vilaĝoj, kaj kunmetis ilin por la skanseno. En la skanseno multfoje okazas panbako, komuna kuirado, vilaĝa tago, artaj prezentadoj, popoldanco k.a.

„Göcseji" Vilaĝmuzeo

Apud la urbo Zalaegerszeg oni elformis imageblan vilaĝon, kie oni konstruis kvardek konstruojn i.a. loĝdomojn, lignopreĝejon, stalojn, garbejojn, akvomuelejon, forĝejon baskulputon, sonorilstablon, brandfaristan kabanon, vinber-montajn vinkelojn, ĉevojajn krucojn kaj plurcent aranĝaĵojn. Tiu skanseno estis la unua subĉiela muzeo en Hungario, kiu malfermiĝis en 1968. La domoj konstruiĝis tiel, ke estas epokfidelaj kopioj de la unustrata tipo en la 19-a jarcento. Per tiu skanseno sukcesis transsavi la lastan memoron de la tradicia vivoformo al la postepoko. Sur la tereno de la skanseno troveblas la „Finnugor Etnografia Parko", kiu prezentas loĝdomojn, ekonomiajn kaj sakralajn konstruaĵojn, instrumentojn kaj popol-kostumojn de la finnugoraj popoloj.



"Göcsei" Vilaĝmuzeo (Sonorilstablo)

„Őrségi" Popolaj Monumentoj

La plej arĥaika kolonio estas la domvicoj, kiuj troveblas en la regiono „Őrség". Tiuj domvicoj konsistas el ok partoj, inter tiuj la plej bela estas la „Pityerszer". La subĉiela muzeo gardas la malnovajn vivoformojn, kaj ankaŭ la domojn kiuj gardas la karakterizajn trajtojn. Sur la montetoj troveblas kelkaj domoj, kiuj estas malstriktaj komunaj formoj de la kolonioj. La ĉi tie vivantaj homoj elformis dum jarcentoj la mozaikajn bildojn de la pejzaĝo. La tradicia konstrumaterialo estis eĉ estas la ligno. La plej praforma domtipo de la teritorio estis la fumoplena domo. Apud la domoj troveblas la t.n. „toka", kion oni uzis por la kolekto de trinkakvo. En la limo de „Szalafő" kaj „Pityerszer" videblas unu el la plej romantikaj skanseno de Hungario. La karakterizaj domoj ekstere kaj interne redonas fidele la iaman vilaĝan realaĵon.

"Örségi" Popolaj Monumentoj

„Sóstói" Vilaĝmuzeo

Tiu muzeo estas subĉiela etnografia muzeo, kiun oni malfermis en 1979 en „Sóstó", kiu estas la urboparto de Nyíregyháza. En la muzeo la vizitantoj povas rigardi la popolajn arkitekturojn de kvin regionoj de la departemento „Szabolcs-Szatmár- Bereg „ La skanseno kontinue evoluas, kaj por nun ĝi estas la plej granda regiona subĉiela, etnografia muzeo en Hungario. Etnobelaj kaj tirpaj (slovakoj el „Nyírség") kamparanaj loĝejoj, ciganaj kabanoj atendas por malkovri tiujn por la vizitantoj. La domoj pretiĝis ĝenerale el agrilbriko, kie la vizitantoj povas refreŝiĝi, ĉar la agrilbriko bone povas gardi la temperaturon en la loĝejo. La skanseno havas sonorilejon, muelejojn, lernejon, pastrodomon, eĉ por diversaj profesioj estas elformitaj apartaj ĉambroj.

„Vasi” Vilaĝmuzeo

"Vasi" Vilaĝmuzeo

La vilaĝmuzeo troveblas en urbo Szombathely, kiu malfermiĝis en 1973. La celo de la muzeo estis por prezenti la kamparanan vivoformon, kaj la popolan arkitekturan kulturon de la pasintaj jarcentoj. La skanseno savis el 27 kolonioj pli ol 40 konstruojn kaj tiujn refoje konstrui. La lokiĝo de la domkompleksoj estas laŭstrata, kaj la konstruaĵoj aperas kiel vilaĝo, kaj ĝi bildigas scenon el la vivo kaj vivmanieron en la kamparana domo. La instalaĵaj objektoj montras la historiajn ŝanĝojn dum la du jarcentoj. Ĉi tie troveblas familiaj mastrumaj kortoj, kromkonstruaĵoj, metiejoj kaj kelkaj publikaj konstruaĵoj. La komunumaj konstruaĵoj ludas gravan rolon en la vivo de la vilaĝoj. Ankaŭ ĉi tie videblas preĝejoj, kapeloj, sonorilstabloj, apudvojaj krucoj, forĝejoj, gastejoj, butikoj kaj lernejoj. La viziton de la vilaĝmuzeo kompletigas tradicigardaj programoj.

„Ópusztaszeri” Subĉiela Etnografia Muzeo

La elformiĝo de la ”Ópusztaszeri” skanseno komenciĝis en 1978, kaj ekde tiam kontinue daŭras. La domkompleksoj prezentas diversajn regionojn de la lando. La vizitantoj povas enrigardi al la vivoj de la 19-a jarcentaj vilaĝoj kaj biendomoj, diversaj metioj, lernejoj, poŝto, spicvendejo, ventmuelejo, etfervojo, bakejo, ĉarkolekto kaj agrikulturaj maŝinoj. La skanseno harmonie interkroĉiĝas al la Nacia Historia Memorparko. Tiel videblas en la ronda vizitanta centro, „Rotunda” la „Feszty-rondpentraĵo”, kies titolo estas „Enpatrujiĝo de la hungaroj”. Okazas multaj interaktivaj kaj hidrologiaj ekspozicioj. Inter la eksteraj vidindaĵoj oni povas rigardi la nomadan parkon, ruinan ĝardenon, kronan jurton kaj la kuriozformajn „Csete”-jurtojn. Komune kun la Nacia Historia Memorparko la skanseno organizas multajn eventoseriojn, inter alie rajdospektaklojn.

"Ópusztaszeri" Subĉiela Etnografia Muzeo („Csete”-jurtoj)

Ankoraŭ funkcias kelkaj hungaraj skansenoj kiel la „Hollókői” Vilaĝmuzeo, „Palotavárosi” Skanseno, „Bodrogközi” Muzeopordego, „Nagyvázsonyi” kaj „Tihanyi” Subĉielaj Etnografiaj Muzeoj. Laŭ la informo en Hungario oni konstruos ceterajn skansenojn, kiuj ankaŭ estas la fieraj prezentadoj de la pasinteco de Hungario.

István Gulyás

MÁV SIMFONIA ORKESTRO

La MÁV Simfonia Orkestro koncertas en la Muzika Akademio

La MÁV Simfonian Orkestron fondis Varga László tiama generaldirektoro de MÁV, en la lastaj tagoj de la dua mondmilito, do en decembro de jaro 1945. La celo estis tio laŭ la generaldirektoro, ke la „fervojo transportu ankaŭ kulturon". Li havis rokfirman konvinkon, ke en la postmilita periodo de la rekonstruo estas bezonata ne nur konstru-materialo kaj nutraĵo, sed ankaŭ la kuracado de la psikologiaj vundoj. Li fondis enlandan turnean orkestron, kiu konsistis ĉefe el fervojistoj, por ke helpe de la muziko donu esperon kaj kuraĝon al la koroj por la rekomencado. Li efektivigis specialan fervojan vagonaron, en kiu formigis dormkupeon por la muzikistoj, kaj en alia vagono oni lokigis la muzikinstrumentojn. Per tiuj vagonoj vojaĝis la orkestro en la tuta lando, kaj donis koncertojn en multaj hungaraj urboj. Komence la orkestro konsistis el amatoraj muzikistoj kaj el la blovorkestroj de MÁV, sed poste ĝi iĝis oficiala grandorkestro. La unua dirigento estis Szőke Tibor, kiu formis veran simfonian kompanion el la amatoraj muzikistoj. Dum la paso de la tempo kuniĝis novaj altinstruitaj muzikistoj al la orkestro.

Ekde tiam forpasis 78 jaroj, kaj la MÁV Simfonia Orkestro iĝis unu el la plej konataj oficialaj orkestroj de Hungario. Ĝia repertuaro disvastiĝas de la baroka muziko ĝis la modernaj nuntempaj muzikaj verkoj. Nuntempe la orkestro prezentas po 100-120 koncertojn jare, kiujn pli ol 50 mil homoj aŭskultas. La orkestro regule kunlaboras kun la Budapeŝta Printempa Festivalo, la Miŝkolca Internacia Operfestivalo, la Budapeŝta Festivalorkestro, la Filharmonia Orkestro en Budapeŝto. La orkestro koncertas en Hungario ne nur en Budapeŝto, sed ankaŭ en la provincaj urboj. La granda artista sciado estas rekonata en la tuta mondo per la internaciaj gastroloj. La orkestro jam koncertis preskaŭ en ĉiuj eŭropaj landoj, krome en Usono, Brazilo, Peruo, Ĉilio, Japanio, Ĉinio, Hongkongo, Suda-Koreio, Argentino, Kolombio kaj Omano kie la orkestro rikoltis grandajn sukcesojn.

La provo de la orkestro en la provĉambrego

En la pasintaj jardekoj la orkestro laboris kune kun mondfamaj deklamistoj, kiel Luciano Pavarotti, Placido Domingo, Ruggiero Ricci, Jeanne-Marie Darré, Lucia Aliberti, Gertler Endre, Cziffra György, Ránki Dezső, Jandó Jenő, Miklósa Erika, Rost Andrea, Vásáry Tamás,Kocsis Zoltán, kaj ankoraŭ mi povus vicigi la artistojn.

La orkestron komandis multaj famaj dirigentoj, nur kelkaj nomoj el inter la eminentaj artistoj: Kurt Masur, Ferencsik János, Kodály Zoltán, Rózsa Miklós, Lamberto Gardelli, Franco Ferrara, Uri Mayer, Nikolai Anosov, Roberto Benzi, Ottmar Swarowsky, Carlo Zecchi, Herbert Blomstedt, Jurij Szimonov, Carlo Ponti, Kobayashi Ken-Ichiro ktp.

La muzikistoj dum la koncerto

La orkestro ricevis multajn rekonojn kaj premiojn, kiel la Bartók Béla-Pásztory Ditta premio, la Széchenyi memormedalo dufoje, la Kavalira Kruco de la Respublika Ordeno, la premio de „Artisjus” ktp. La premion de la „Internacia Mensch Fonduso” ricevis Lendvai György, la direktoro de la MÁV Simfonia Orkestro pro la konzervado de la muzika kulturo, pro la ekzemplodona humaneco kaj pro la elstara komunuma aktiveco.

Farkas Róbert estas la gvida dirigento, kiu konigis la ĉijaran programon de la orkestro. Laŭ tio ni povas aŭskulti la amon pere de la lingvo de la muziko. Ni povas renkontiĝi kun realaj kaj fantaziaj amparoj, ekzemple ni povas ekkoni la amrilatojn de la Cosima Liszt kaj Richard Wagner, la interrilaton de Richard Strauss kaj la edzino Pauline, la amdramon de Romeo kaj Julia, kaj Sámson kaj Delila, eĉ ankaŭ en verkoj de Csajkovszkij, Strauss, Dvorák, Jenacek, Stravinszkij kaj Liszt rolas la amo. Estis granda sukceso la opero „Porgy and Bess (Gershwin), kiun la orkestro muzikis en Sud- kaj Nordameriko antaŭ plenŝtopitaj spektantoj. Estas bona sciigo, ke en majo de 2024 denove okazos komuna koncerto kun Kobayaŝi Ken-Ichiro, kaj poste la orkestro vojaĝos kun li al Japanio por trisemajna koncertserio.

Okazis ĝojplena sciigo, ke la orkestro povas translokiĝi al nova konstruaĵo. Tiu konstruaĵo estis antaŭe la VOKE kulturdomo kaj biblioteko en la urboparto „Ferencváros”. Tiun kulturdomon MÁV renovigis, pro tio la orkestro havas vastan kaj modernan provĉambregon, kaj priservantajn ejojn. Tiujn „loĝlokojn” MÁV transdonis al la orkestro por longdistanca senpaga uzado.

La violonistoj dum la koncerto

La hungaraj fervojistaj esperantistoj antaŭ kelkaj jardekoj havis jarajn abonbiletojn al la koncertoj de la MÁV Simfonia Orkestro. Ni ĉiuj ege ĝuis la altnivelajn koncertojn, pri kio aperis artikolo en nia faka revuo Hungara Fervojista Mondo.

István Gulyás

FORTIKAĴOJ SUR LA ALTLANDO DE LA BALATONO

Alproksimiĝas la aŭtuno, sed la lago Balatono kaj la fortikaĵoj restas. La norda parto de la lago ankoraŭ nuntempe proponas nenombreblajn ekskurseblecojn anstataŭ la baniĝo. La vulkanaj insulmontoj (tanuhegyek) kun mirindaj panoramoj, la fortikaĵoj de la ĉirkaŭaĵo atendas la ekskursantojn kun veraj mezepokaj humoroj. Estas sufiĉe viziti iun fortikaĵon, la vizitantoj rapide povas reflugi plurcentajn jarojn en la tempo. La historioj de la kavaliroj, heroaj militestroj, kurucoj kaj labancoj, reĝoj kaj reĝinoj reviviĝas en tiuj fortikaĵoj.

La fortikaĵruinoj same apartenas al la balatona pejzaĝo kiel la vinberoj, premildomoj, somerdomoj aŭ kapeloj. Kelkaj ruinoj restis kiel ŝtonamaso, aliajn la turistoj povas vizitadi kaj ĉirkaŭiri, ĉar tiujn ruinojn oni renovigis. Multaj fortikaĵoj troveblas en la Altlando de la Balatono, eĉ ankaŭ ĉe la suda parto de la lago troveblas kelkaj fortikaĵoj. Kelkajn fortikaĵojn mi iomete detale prezentas, kaj la aliajn mi nur denombras.

La fortikaĵo Szigliget

Unue ni vizitu „la fortikaĵon de la Balatono”, kiu estas **Szigliget.** El la bonetosa fortikaĵo prezentiĝas unika landvidaĵo. La vidaĵo de la Balatono kaj la insulmontoj en ĉiuj sezonoj estas obsede belaj. La fortikaĵo estas 700 jara, kiu apartenis komence al la Pannonhalma Ĉefabatejo, poste estis reĝa havaĵo, kaj en la turkaj tempoj ĝi estis limfortikaĵo, kiun la turkoj neniam povis konkeri. En jaro 1697 la pafpulvoran turon fulmofrapis, kiu kadukigis la turon, kiun post kvin jaroj ankoraŭ la restiĝajn ruinojn la imperiestro eksplodigis. Sed la fortikaĵo neniam pereis, kaj dum la grandioza rekonstruado ĝi renoviĝis.En la fortikaĵo troveblas pluraj ekspozicioj, kiel la armila- kaj fortikaĵhistoria ekspozicio. Tamen la altirforto de tiu fortikaĵo estas la unika panoramo, kiu ravis ĉiujn vizitantojn.

La alia fortikaĵo estas **Sümeg,** kie „la historio revivigas”. La fortikaĵo altiĝas sur la monteto de la urbeto Sümeg, kiu regas la pejzaĝon kaj altiras la rigardon. En la murego troveblas multaj bastionoj. Ĝi estas unu el la plej belaj mezepokaj fortikaĵoj, kiu restis en konservita. En la fortikaĵo oni gardas la tradiciojn, kaj revivigas la ĉiutagan mondon de la iamaj kortegaj kaj bravaj vivoj. La vizitantojn atendas vera mezepoka atmosfero post la trapaŝo de la baskulponto. Multegajn vidindaĵojn trovas la vizitantoj, kiuj estas ekspozicio pri la historioj de la fortikaĵoj dise en la norda

La fortikaĵo Sümeg

parto de la Balatono, krome rozĝardeno, mezepoka kuirejo, bakejo, veturilfarista metiejo kaj forĝejo. Sur la malsupro de la fortikaĵmurego estas la historia travivaĵparko, kie oni povas ekkoni la ŝtonĵetajn maŝinojn, propulsilojn kaj aliajn mezepokajn batalilojn. La kulmino de la vizito estas la kavaliraj ludoj.

La tria fortikaĵo estas **Nagyvázsony**, kiu estas „la fortikaĵo de la heroa Kinizsi". Ĝi troveblas sur la dekliveto de la Altlando de Balatono. La fortikaĵo konstruiĝis apud la rivereto. Ĝi ricevis sian bonfamon de la „Muelŝtona Bravulo" Kinizsi Pál, kiu ricevis tiun fortikaĵon de la reĝo Mátyás pro la braveco en la militiroj de la reĝo. La sorto de la fortikaĵo estis aventurplena, ĉar post la morto de Kinizsi sia edzino neglektis la fortikaĵon, poste okazis tertremo kaj incedio. Sed la ĉilokaj homoj ne lasis perdi la fortikaĵon, kiun dum la jarcentoj oni plurfoje renovigis. La t.n. Maljuna Turo, kiu havas 25 metrojn, estas maloftaĵo ne nur en Hungario, sed en Eŭropo en tiu tempo. Kuriozaĵo estas la kaptokavo por lupoj, la barbakano kaj la fekbudo. Dum la somero okazis multaj festivaloj, kulturaj programoj kaj aliaj mezepokaj kaj nuntempaj spektakloj.

La fortikaĵo Nagyvázsony

La vilaĝo **Csesznek** troveblas en la norda parto de la montaro Bakony, kiun sorĉigas la harmonioj de la valoj, altplataĵoj, montoj kaj riveretoj. Apud la vilaĝo estas sur elstariĝa kruta roko la 700-jara belega fortikaĵo Csesznek, kiu estas la plej vidinda fortikaĵruino de la montaro Bakony, kaj apartenas al la plej belaj ekskursejoj de la lando. La unuaj skribaj fontoj mencias en la XIII-a jarcento la csesznekan fortikaĵon, kiun konstruigis Cseszneki Jakab. Poste la fortikaĵon oni alikonstruigis, per kio ĝi iĝis impona kavalira kastelo. Dum la jarcentoj la fortikaĵo plurfoje ŝanĝis posedantojn. En la periodo de la turkoj la fortikaĵo iĝis limfortreso, kaj ĝi kontraŭstaris al la turka okupado. En la tempo de la Rákóczi-speca liberecbatalo ĝi estis rekompletiga nodo de la kurucoj. La florepoko de la fortikaĵo estis en la XVIII-a jarcento, kiam la fama familio Eszterházi alikonstruigis ĝin al barokstila fortikaĵo. En la jaro 1810 la fortikaĵon detruis tertremo kaj post kelkaj jaroj fulmofrapo. Poste la loka loĝantaro uzis la fortikaĵon kiel ŝtonminejo, pro tio ili tute forportis la malsupran fortikaĵparton. La arkeologiaj esploroj de la fortikaĵo komencis en 1967, ekde tiam oni rekonstruis ĝin, kaj plilarĝigis kun novaj elementoj.

La fortikaĵo Csesznek

La fortikaĵo **Somló** troveblas en la Altlando de la lago Balatono apud la vilaĝo Doba. Ĝi situas sur la norda parto de la 433 metrojn alta vulkanorigina monto Somló en densa arbaro. Mem la monto estas fama pro la bazaltaj kolonoj, kaj kompreneble pro

la fortikaĵo. Tiu fortikaĵo konstruiĝis sur vulkana konuso. La fortikaĵon antaŭlonge oni povis malfacile alproksimigi, ĉar antaŭ la enirejo estas okmetra seka foŝaĝo. La plandesegno de la fortikaĵo estas senregula, kaj havas internajn turojn kaj kelkajn kortojn. Sur la fendego transkondukas levponto, kiu sendifekte restis dum la jarcentoj, kaj ĝi enbuŝiĝas al strateto kaj antaŭkorto. El la antaŭkorto kondukas ankaŭ levponto tra malvasta strateto al la interna korto. Ĉi tie troveblas la ses-angula turo de la fortikaĵo. La fortikaĵo konstruiĝis post la mongola invado. Unue ĝi estis reĝa posedaĵo, kaj en 1495 aĉetis ĝin Bakócz Tamás episkopo, kiu plene ordigis kaj konstruigis ĝin al itala renesanca fortiligita palaco. Poste la fortikaĵon posedis pluraj posedantoj ĝis jaro 1945, kiam la proprieto de la fortikaĵo herediĝis al la ŝtato. La fortikaĵon oni renovigis ekde 2017 en la kadro de la Nacia Fortikaĵprogramo. La renoviga laboro finiĝis en 2022, kaj la fortikaĵo regajnis la originalan eksteran formon, eĉ la kurieron, la kazernon de la soldatoj kaj la krenelojn.

La fortikaĵo Somló

La fortikaĵo **Rezi** troveblas okcidente de la lago Balatono en la arbarkovrita plataĵo de Keszthely. Ĝi apartenas administracie al la vilaĝo Rezi, kiu situas relative malproksime de la fortikaĵo. La fortikaĵo konstruiĝis en la fino de la 1200-aj jaroj, kiun la skribaj dokumentoj unue menciis en jaro 1333. Kiel ĉiujn fortikaĵojn dum la jarcentoj posedis multaj riĉaj aristokratoj kaj reĝoj, ankaŭ la sorto de la fortikaĵo Rezi estis sama. En la 1580-aj jaroj la fortikaĵon aĉetis la familio Pethő, sed la reordigaj laboroj elĉerpiĝis la resursojn de la familio, kaj la familio parte faligis la fortikaĵon. Tiam pereis du turoj kaj la granda parto de la muregoj. Poste la familio Festetics aĉetis la ruinan fortikaĵon, sed ĝi plu detruiĝis. En jaro 1945 la fortikaĵo estis ŝtatigita. La fortikaĵon la ŝtato komencis konservi kaj parte restarigi nur post la jaro 2000. Mi rimarkas, ke ekde la konstruiĝo de la fortikaĵo atingis multajn sortoturnojn malgraŭ tio, ke ĝi neniam okupis gravajn militistajn rolojn kaj funkciojn.

La fortikaĵo Rezi

István Gulyás

D-ro IMRE FERENCZY
(25.07.1932 – 01. 09.2023)

La 1-an de septembro 2023 mortis **D-ro Imre Ferenczy** en sia 91-a jaraĝo.
La mezlernejajn studojn li finfaris en urbo Esztergom. Poste li daŭrigis la studojn en la Universitato de Szeged, poste en la Universitato de Medicinaj Sciencoj en Budapeŝto, akirante ĝeneralan medicinan diplomon en 1957. Li laboris pri interna medicino en hospitalo Parádfürdő inter 1957 kaj 1960, kaj poste li translokiĝis al la MÁV-hospitalo en Pécel por unu jaro. Inter 1961 kaj 1998 li laboris kiel fervojista ĉefkuracisto de la fervoja nodo Győr. Li aktivis ankaŭ kiel sportkuracisto ĉe la futbalklubo Győri MÁV DAC dum 43 jaroj. Pro tio li ricevis diplomon kiel „Hungara rekordulo".
Li estis esperantisto ekde 1950 kaj li estis elstara individuo de la fervojista Esperanto-movado, kaj li solvis multajn taskojn sur la tereno de la enlanda kaj internacia Esperanto-movado. Lia unua Esperanto-aktiveco estis en 1955 kunfondi la Hungarlandan Esperanto-Konsilantaron. En la kadro de la 14-a IFEF-kongreso okazinta en Budapeŝto,la komitato elektis lin kiel prezidanto de la Internacia Komitato de Junuloj. Li estis ekde 1985 dum jardekoj la prezidanto de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kaj samtempe estis membro de la redaktantaro de Medicina Internacia Revuo (MIR), la organo de UMEA. Samtempe li estis gvidanto de la radioamatora sekcio de la fervojistoj. Krome delonge li estis estrarano de la hungara fervojista organizaĵo.

Li establis Esperanto-grupon en la MÁV Hospitalo Pécel, kaj poste li estigis fervojistan fakgrupon en urbo Győr. Li organizis kelkajn "Landajn Amikajn Fervojistajn E-Renkontiĝojn".Li estis komitatano „A" de UMEA ĉe UEA dum multaj jardekoj, kaj ĝis nun li estis la gvidanto de la Kontrola Komitato de nia Asocio. Li iniciatis la kunlaboran interkonsenton inter la IFEF kaj UMEA, kion IFEF plue daŭrigis kun ceteraj asocioj.

Li ricevis multajn distingojn, kiel la Premio Shinoda de UMEA pro sia elstara medicinmovada agado, Honora Membro de Hungaria Esperanto Asocio (1994), Honora Membro de UEA (2003), Honora Prezidanto de UMEA ktp. En 2007 li ricevis la jubilean oran diplomon pro sia 50-jara kuracista agado, kaj en 2017 li ricevis la diamantan diplomon kaj en 2022 la feran diplomon ĉe la Medicina Universitato Semmelweis.

Li aŭtoris du verkojn: „Esperanta Medicina Vortaro" (2009), kaj „Mi estis fervojista kuracisto" (2012), en kiu li skribis pri la travivaĵoj en la pli ol 40 Universalaj Kongresoj kiujn li partoprenis en la tuta mondo ekde la jaro 1973. Krom la eŭropaj landoj li estis en Kubo, Koreio, Kanado, Aŭstralio, Israelo, Brazilo (dufoje), Ĉinio (dufoje) kaj Japanio. Medicinan studvojaĝon li faris en Usono en jaro 1998.
Li estis la plej maljuna aktiva hungara esperantisto.
D-ro Imre Ferenczy forlasis nin, sed la memoro pri li restos ĉiam ĉe ni. Ripozu en paco!

Budapeŝto, 1-an de septembro 2023

Hungara Fervojista Esperanto Rondo

La korto de la "Sóstói" Skanseno.

Esperantistoj el Tanzanio en la 108-a UK.
En Tanzanio okazos la 109-a UK en 2024.